

RETKOMUNIKOJ 4/2010

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperantomovado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonajn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:

1. RAPORTO DE ELEKTOKOMISIONO DE ĈEA
2. LA 96-A UK EN KOPENHAGO
3. NOVA EKSPozICIO EN ESPERANTO-MUZEo PREPARATA
4. MOZAIKO – NOVA VIKIMAGAZINO DE INTERESAĴOJ
5. RETO DE LOKAJ/DISTRIKTAJ DELEGITOJ EN ĈEĤIO
6. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS (oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)
7. KALENDARO DE E-EVENTOJ en Ĉeĥio kaj organizitaj el Ĉeĥio

1. RAPORTO DE ELEKTOKOMISIONO DE ĈEA

En la ĈEA-kongreso okazonta 2011-10-07/09 en Ŝumperk efektiviĝos ankaŭ balotoj, do oni elektos la novajn komitaton kaj kontrolan grupon de ĈEA. Jam komencis labori elektokomisiono en la konsisto: Petro Chrdle (gvidanto), chrdle@kava-pech.cz, Věra Podhradská, podhradska@volny.cz kaj Marek Blahuš marek@blahus.cz

Ni tre petas vin mem kandidatiĝi (validas nur por la membroj de ĈEA), se vi sentas vin konvena por partopreni la gvidan rolon en la asocio, aŭ rekomendi kandidatojn. Per tio vi ege helpas al la laboro de la elektokomisiono.

Antaŭdankon por via helpo elekti novan efikan gvidorganon.

2. LA 96-A UK EN KOPENHAGO

La 96-a Universala kongreso de Esperanto okazos en 2011 en dana ĉefurbo Kopenhago de la 23-a ĝis la 30-a de julio. Ĝin antaŭigos la Internacia junulara kongreso kaj senpere post ĝi okazos la ILEI-konferenco. Pro jam pluraj demandoj, ĉu estos organizata komuna veturo aŭ flugo al ĝi jen la respondo: Oni ne antaŭvidas komune organizitan vojaĝon, precipe ĉar la konekto inter Prago kaj Kopenhago estas vere senproblema: rektaj fluglinioj kaj buslinioj, aŭ trajna vetureblo kun ununura ŝanĝo en Berlino. Tial certe neniu interesato havos problemon partopreni individue. Rilate al la aliĝiloj bv. kontakti la ĉefdelegiton de UEA por Ĉeĥio Lucie.Karesova@seznam.cz

La 97-a Universala kongreso okazos en la jaro 2012 en Hanojo, Vjetnamio.

3. NOVA EKSPOZICIO EN ESPERANTO-MUZEEO PREPARATA

Bv. ne forgesi, ke en Svitavy estas Esperanto-muzeo kun daŭra ekspozicio pri Esperanto-movado kaj ties historio, kaj krom ĝi ankaŭ portempa ekspozicio. Tiu dua momente prezentas la verkon de la ĉeĥa humoristo, desegnisto, ilustristo kaj esperantisto Pavel Rak. Ĝi daŭros ĝis majo 2011.

Do jam nun ni kolektas materialojn por la sekvanta portempa ekspozicio, kies temo estos „Esperanto kaj spiritaj tradicioj de la mondo“. Se vi posedas iujn materialojn pri religioj aŭ filozofioj kaj iliaj rilatoj al Esperanto, ni tre petas vin pri la kontribuo al tiu ekspozicio. Viajn objektojn vi povas donaci al la muzeo (tiukaze ili restos post la fino de la ekspozicio en la depozito), aŭ almenaŭ pruntedoni, tamen bv. kalkuli kun tio, ke la ekspozicio daŭros 12 monatojn ĝis la majo 2012.

Objektojn konvenajn por ekspozicio, kujn vi pretus pruntedoni, bv. ne tuj sendi al la muzeo, sed unue nur priskribi ĝin (laŭeble kun fotografaĵo aŭ almenaŭ detala priskribo), por ke la muzea grupo povu unue prijuĝi, ĉu ĝi vere povos esti uzita por la ekspozicio kaj la rezulton komunikos al vi. Antaŭdankon al ĉiuj, kiuj helpos, ke la ekspozicio estu kiom eble plej informriĉa kaj samtempe estetike bela. Info: dvor.libuse@seznam.cz

4. MOZAIKO – NOVA VIKIMAGAZINO DE INTERESAĴOJ

komencis aperi 3.9. en la ĈEA-retpaĝaro www.esperanto.cz en la rubriko Aktualajoj. Tiu ĉi projekto redaktata de Pavla Dvořáková celas precipe proponi kvalitajn artikolojn pri interesaj temoj el E-Vikipedio kaj motivigi tiel esperantistojn al pli ofta utiligado de ĝi. Aperante ankaŭ dulingve en la

ĉeĥlingva versio de la retpaĝaro ĝi celas krome ĉeĥlingvan neesperantistan publikon prezentante Esperanton kiel egalvaloran lingvon kapablan alporti aktualajn informojn pri ĉiuj homaj fakoj.

La unua numero <http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/mozaiko-nova-vikimagazino-de-interesa-oj-prezentas-sin.html> kondukas nin al Armenio, konatigas kun historio de Inkaa imperio, kun muziko de F. Chopin, vivo de Gandhi, delfenoj, aikido, kanto de Kajto k.a.

La dua numero <http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/vikirevuo-mozaiko-n-ro-2.html> alportas informojn ekz. pri korea lingvo, vivperipetioj de Budho, historio de ventra danco, optika iluzio, sekretoj de briĝo, la damnita poeto Arthur Rimbaud, slovaka E-dublita filmfabeleto k.a.

Vi estas bonvenaj legi por vi interesajn artikolojn, rekomendi la magazinon al viaj geamikoj kaj sendi proponojn por kontribuadoj en sekvaj numeroj. Retpoŝtadreso de la redakcio: komputado@esperanto.cz. La sekva numero aperos la 1-an de novembro.

5. RETO DE LOKAJ/DISTRIKTAJ DELEGITOJ EN ĈEĤIO

Nombro de ĉeĥaj urboj, kie aktivas E-klubo, bedaŭrinde malpliigas, tamen estas nepre dezirinde havi sur distriktaj niveloj almenaŭ lokajn reprezentantojn pri Esperanto. Tial ĈEA-estraro venas kun ideo kompletigi reton de kluboj per reto de lokaj/distriktaj delegitoj, kapablaj ekz. informi pri Esperanto lokan gazetaron kaj individuajn interesiĝantojn pri lernado (sed NE nepre mem instrui ilin), helpi E-gastojn el eksterlando (gastigo en propra hejmo NE estas kondiĉo!), ev. – nedevoŝtigi - traduki turismajn materialojn pri sia urbo kaj ĉirkaŭaĵo aŭ laŭeble helpi kompletigi informojn pri historio de E-movado en la koncerna loko. Tiu funkcio sendube ne estas tro tempopostulema kaj inkluzivas nur fojfojan engaĝiĝon, sed por ĝenerala prezento de nia movado sendube enesto de ĝuste VIA urbo estas tre grava! La reta kaj telefona kontaktoj aperus i.a. en www.esperanto.cz en la rubriko Kontakty. Ju pli densa nia reto estos, des pli imponan impreson (ankaŭ da

nke al via ev. engaĝiĝo) ĝi donos al la publiko!

Per tiu ĉi informo ni nur sondas la intereson de la membraro. Se principe vi pretus akcepti la rolon de delegito por via urbo, resp. distrikto, bv. nedevoŝtigi anonci vin kaj skribi viajn ideojn al: pavla.esperanto@gmail.com. Se reagoj estos pozitivaj, ni plu prilaboros la projekton kaj rekontaktoŝ vin por precizigi la kondiĉojn. Ni antaŭĝojas vian kunlaboremon!

6. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS (oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)

Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) travivis eventoriĉan someron. En Kubo Marek BLAHUŠ gvidis nome de KAVA-PECH 18-kapan kongres-turisman grupon, reprezentis ĈEA en la 95-a UK kaj ĈEJ en la 66-a IJK. Dan MRÁZEK prezentis esperanton en ĵurnalisma tendaro, Mirek HRUŠKA en SET Lančov. Bára ZÁVODSKÁ vartis denaskulojn en Francio kaj gastigis en Belgio. Jiří GALUŠKA kun Juraj PROCHÁZKA (SKEJ) vizitis Krimeon. Petr DOHNÁLEK kun Marek BLAHUŠ ĉeestis jubilean IKUE-kongreson en Parizo. Miloš VESELÝ, Marek BLAHUŠ, Vlasta PIŠTÍKOVÁ kaj Vít MIŠUREC partoprenis Someran Esperanto-Studadon en Piešťany. La lastaj du ankaŭ la IJS-n en Pécs.

La 20-an de junio Marek BLAHUŠ kaj Mirek HRUŠKA ĉeestis la tradician ĉeĥan-polan-slovakon supreniron al Ĉantorio, okaze de kiu antaŭ 5 jaroj finfondiĝis ĈEJ. Semajnon antaŭe dum la esperanto-muzeonokto en Svitavy ĉeestis 7 ĈEJ-anoj (inter ili hispano Cesáreo GARCÍA FERNÁNDEZ studanta en Brno). Jam komence de junio Vlasta PIŠTÍKOVÁ kaj Vít MIŠUREC ĉeestis la renkontiĝon "Blue floras la genciano" en Aŭstrio.

La ĈEJ-vicprezidanto Marek BLAHUŠ fariĝis staĝanto de E@I en Nancy (Francio), per la EU-programo ERASMUS. Li forestos ĝis majo 2011 kaj atingeblos rete, aŭ telefone ĉe +33760168165. Jam aŭguste li apud Tuluzo ĉeestis la aranĝon FESTO, septembre li instruis en germana-franca seminario en Rastatt. Fine de junio Radio Proglas aŭdigis intervjuon kun li, parte pri esperanto.

Mirek HRUŠKA kunlaboris kun Pavla DVOŘÁKOVÁ kaj anstataŭis ŝin dum septembra komputila seminario en Česká Třebová. En la revuo Kontakto 2010:3 (237) kun temo "Urboj - interesaj kaj impresaj" aperis lia artikolo pri Brno. Krom respondeci pri aranĝoj de ĈEJ, fine de junio li fariĝis komitatano de la asocio E-lingvo.

De la 24-a ĝis la 26-a de septembro Daniel MRÁZEK kun Jana GROSMANOVÁ partoprenis la aranĝon ArKonEs en Poznań. Samtempe Mirek HRUŠKA reprezentis ĈEJ dum la ĈEA-konferenco en Poděbrady. Novula renkontiĝo en praga ZOO la 2-an de oktobro kunvenigis 8 esperantistojn, el tio 2 novulojn. Ĝenerala asembleo de ĈEJ estas planata por la 13-a de novembro kadre de renkontiĝo en Žirovnice (<http://esperanto.blahus.cz/cxej/?zirovnice10>). Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe <http://cej.esperanto.cz/>

7. KALENDARO DE E-EVENTOJ en Ĉeĥio kaj organizataj el Ĉeĥio:

2010-11-12/14: Jarkunveno de Ĉeĥa Esperanto-Junularo en Žirovnice. Info: Hruška Miroslav miro.volny@centrum.cz

2010-11-18/21: KAEST (Konferenco Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko), post 12 jaroj de regulaj okazaĵoj en Ĉeĥio kaj antaŭe alterne en Slovakio kaj Ĉeĥio, ĉi-foje denove KAEST revenas al Slovakio, Modra-Harmónia. Info: www.ikso.net/kaest aŭ petro@ikso.net (Petro Baláž)

2010-12-05: Marcipana Kristnasko, propramane produkto de marcipanaj dolĉaĵoj sub la gvido de profesiulo Anna Vyšínková, Svitavy, info: dvor.libuse@seznam.cz

2010-12-11: Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek. Kultura matineo en Urba biblioteko omaĝe al Tago de E-libro, adventa programo kun d-ro Max Kašparů kaj aŭtografado de lia libreto „Kristnaskaj demandoj kaj paradoksoj“, adventa ekspozicio kaj mineralogia borso en urbe, solena kristnaska posttagmezo. Info: pisek@esperanto.cz

2010-12-29: Silvestra amuziĝvespero en Česká Třebová. Info: Jan Křížková, jk.esperanto@seznam.cz

2011-04-1/3: La 6-a Sabla Printempo, ĉi-foje en Milevsko. Info: pisek@esperanto.cz

2011-04-11/16: Lingva seminario en Skokovy. Aranĝo de AEH, sed ne nur por handikapitoj. Info: nechvilep@seznam.cz

2011-04-15/29: Flugkaravano al Ĉinio lige al Internacia Esperanto-Konferenco en Wuhan pri la temo „La ĉina saĝo“. Ŝanhajo – Wuhan – pejzaĝo ĉirkaŭ la rivero Li (homolsimilaj montetoj, terasoformaj rizejoj, ...) – Honkongo. Info: www.kava-pech.cz/wuhan aŭ chrdle@kava-pech.cz

2011-05-07/14: La 63-a IFEF-kongreso, Liberec, Kongresa centro Babylon. Info: www.ifef.wz.cz aŭ ladislav.kovar@tiscali.cz

2011-06-04: Inaŭguro de nova ekspozicio en Esperanto-Muzeo Svitavy pri la temo „Esperanto kaj spiritaj tradicioj de la mondo“, enkadre de Muzea nokto. Info: dvor.libuse@seznam.cz

2011-06-10/12: Solenaĵo omaĝe al centjariĝo de Esperanto-klubo en Olomouc. Info:

dudajanol@centrum.cz

2011-06-18: Infana tago en Svitavy. Info: dvor.libuse@seznam.cz

2011-06-19: Tradicia renkontiĝo (jam 75 jarojn!) de ĉeĥaj, polaj kaj slovakaj esperantistoj sur la pinto de la monto Ĉantorio sur ĉeĥa-pola landlimo. Info: suchanekj@seznam.cz

2011-07-03-/16, 07-17/30, 07-31/08/13: Tri etapoj de la 59-a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov apud Vranov-lago. Info: podhradska@volny.cz

2011-07-14/21: Kongreso de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) en Olomouc. Info: priborsky@brailnet.cz

2011-08-02/09: Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) en Poděbrady. Info: cea.polnicky@quick.cz

2011-08-12/14: Renkontiĝo de iamaj partoprenintoj de Someraj Esperanto-Tendaroj en Lančov. Info: podhradska@volny.cz

2011-09-10: Postferia renkontiĝo en Putim. Info: pisek@esperanto.cz

2011-09-11/18: EKOTUR 11. Tradicia ekoturisma renkontiĝo por biciklantoj kaj piedturistoj en Dobřichovice (itineroj en Bohemia Karsto kaj montetaro Brdy). Info: chrdle@kava-pech.cz

2011-10-07/09: Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Šumperk Info: Tomecek@esperanto.cz, brzy také budou podrobnější informace na www.esperanto.cz

2011-12-10: Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek. Info: pisek@esperanto.cz

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al chrdle@kava-pech.cz. Ne eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.

Por resti daŭre informataj pri la Esperanto-aranĝoj bv. sekvi <http://www.esperanto.cz/cs/akce>

Atentu, ke en ĉi tiu kalendaro estas envicigitaj nur eventoj okazontaj en Ĉeĥio aŭ organizataj de Ĉeĥio. La plej kompletan kalendaron de Esperanto-eventoj en la tuta mondo, sed ankaŭ plurajn utilajn informojn, vi trovos ĉe www.eventoj.hu